

Karaj samideanoj,

unue pardonon por la nepetita retmesagxo. Kiu ne volos gxin ricevadi, sufixas respondo kun simpla sciigo "ne sendu" aux cxehxe "neposilat" kaj ni forviskos vin de la dissendolisto. Ni tamen esperas, ke la plejparto de vi bonvenigos cxi tiun novan informfonton.

Jen vi ricevas la unuan numeron de la retkomunikoj de Cxehxa Esperanto-Asocio (CEA-RK). Ni sendas gxin al cxiuj al ni konataj retadreso de cxehxaj esperantistoj (sendepende cxu ili estas membroj de CxEA aux ne), sed se iu de vi ne deziras ricevadi ilin, sufixas simpla Re: kaj unuvorta sciigo kaj ni tuj forigos vin de la listo.

Krom al la cxehxaj esperantistoj ni sendas gxin informcele ankaux al la gvidantoj de najbarlandaj EA-j, respondeculo de UEA pri landa agado, gvidanto de la mezeuxropa komisiono de UEA kaj al la redaktoroj de kelkaj revuoj (Revuo Esperanto, Eventoj, HdE).

Ne temas pri retforma gazeto, sed pri la oficiala komunikilo de CxEA, kiu ne havas respondecan redaktoron, sed pri kiu respondecas cxiuj rete atingeblaj pintaj funkciuloj de CxEA. Sendepende de tio, kiu origine proponas la tekston por la dissendo, cxiam gxi estas unue diskutata dum unu semajno inter tiu redaktogrupo kaj nur poste dissendata. Tial mankos subskriboj sub la unuopaj komunikoj kaj ilin eblos konsideri oficiala starpunkto de CxEA. La retadreso de Petro Chrdle servas nur por distribui la retkomunikojn, sed lia posedanto estas en la sama pozicio dum ilia kreo kiel cxiuj ceteraj.

Kiu do staras persone malantaux la CxEA-retkomunikoj? Jen ili: Vera Podhradská - prezidantino de CxEA, Petro Chrdle - vicprezidanto de CxEA, Jan Repa - vicprezidanto de CxEA, Pavel Polnický - sekretario de CxEA, Jana Melicharková, prezidantino de Pedagogia sekcio de CxEA (samtempe Cxehxa sekcio de ILEI), Miroslav Malovec - redaktoro de Starto, Zdeněk Pluhár - gvidanto de Libro servo de CxEA. Josef Hron, membro de kontrola komisiono de CxEA).

La retkomunikiloj estos dissendataj neregule laux bezono kaj ili estos vicigitaj komence de la linio "objekto" (por faciligi la orientigon por tiuj, kiuj storo ilin en sia komputilo). La formo de la objekto do estos ekzemple "2 CEA-RK: libro servo" (se temos pri la libro servo - nur ekzemplo).

Ni pripensas ankaux fondi similan vicon de cxehxlingvaj komunikoj por komencaqntoj kaj amikoj de esperanto, sed unue ni startu unu servon, kaj se ni havos sufcie da energio ni aldonos la duan lingvan version.

Tiom por hodiaux, en la numero 2 ni jam skribos pri io konkreta.

Cxiuj viaj intervenoj estas bonvenaj sed bv. kompreni, se ni ne

responsos ilin. Ne temas pri malintereso diskuti, sed pri efektive
nesuficaj tempo kaj energio - estas multaj diskutlistoj en Esperanto
por tiuj, kiuj volas diskuti. Tamen, se temas pri iuj rimarkoj al la
adreso de CxEA, cxiuj estos ne nur notitaj, sed ankaux pritraktataj
dum la plej proksima kunsido de la CxEA-estraro.

Karaj samideanoj,

jen vi ricevas la unuan numeron de la retkomunikoj de Cxehxa
Esperanto-Asocio (CEA-RK). Ni sendas gxin al cxiuj al ni konataj
retadresoj de cxehxaj esperantistoj (sendepende cxu ili estas membroj
de CxEA aux ne), sed se iu de vi ne deziras ricevadi ilin, sufcixas
simpla Re: kaj unuvorta sciigo kaj ni tuj forigos vin de la listo.

Krom al la cxehxaj esperantistoj ni sendas gxin informcele ankaux al
la gvidantoj de najbarlandaj EA-j, respondeculo de UEA pri landa
agado, gvidanto de la mezeuxropa komisiono de UEA kaj al la
redaktoroj de kelkaj revuoj (Revuo Esperanto, Eventoj, HdE).

Ne temas pri retforma gazeto, sed pri la oficiala komunikilo de CxEA,
kiu ne havas respondecan redaktoron, sed pri kiu respondecas cxiuj
rete atingeblaj pintaj funkciuloj de CxEA. Sendepende de tio, kiu
origine proponas la tekston por la dissendo, cxiam gxi estas unue
diskutata dum unu semajno inter tiu redaktogrupoj kaj nur poste
dissendata. Tial mankos subskriboj sub la unuopaj komunikoj kaj ilin
eblos konsideri oficiala starpunkto de CxEA. La retadreso de Petro
Chrdle servas nur por distribui la retkomunikojn, sed lia posedanto
estas en la sama pozicio dum ilia kreo kiel cxiuj ceteraj.

Kiu do staras persone malantaux la CxEA-retkomunikoj? Jen ili:
Vera Podhradská - prezidantino de CxEA, Petro Chrdle - vicprezidanto
de CxEA, Jan Repa - vicprezidanto de CxEA, Pavel Polnicky -
sekretario de CxEA, Jana Melicharková, prezidantino de Pedagogia
sekcio de CxEA (samtempe Cxehxa sekcio de ILEI), Miroslav Malovec -
redaktoro de Starto, Zdenek Pluhar - gvidanto de Libro servo de CxEA.
(Josef Hron, membro de kontrolo (revizia???) komisiono de CxEA).

La retkomunikiloj estos dissendataj neregule laux bezono kaj ili
estos vicigitaj komence de la linio "objekto" (por faciligi la
orientigon por tiuj, kiuj storo ilin en sia komputilo). La formo de
la objekto do estos ekzemple "2 CEA-RK: libro servo" (se ni
proskribos nian libroservon - nur ekzemplo).

Ni pripensas ankaux fondi similan vicon de cxehxlingvaj komunikoj por
komencantoj kaj amikoj de esperanto, sed unue ni startu unu servon,
kaj se ni havos sufcixe da energio ni aldonos la duan lingvan
version.

Tiom por hodiaux, en la numero 2 ni jam skribos pri io konkreta.